



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencej. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero,—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencej.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 119 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. 10 Majo 1930.

ESPERANTO IN THE NEW RUSSIA.

From "Russia Today and Yesterday," p.p. 185/6, by Dr. E. J. Dillon, author of "Russian Characteristics," and "The Eclipse of Russia"; formerly professor of comparative philology, Univ. of Kharkoff, and editor of Odessia Novosti"; private adviser to Count Witte, 1903-14; Russian correspondent of the "Daily Telegraph," 1889-1914.

"Long epistles, well worded in Russian, were received in Moscow from Japanese scholars, men of letters, journalists and students. But they were not all indited in the language of Pushkin and Dostoevsky. Many letters were couched in an artificial language employed down to the Revolution mainly by collectors of stamps, postcards and coins, but which, owing partly to the exertions of Madame Kameneva and her fellow-workers, has spread over vast stretches of the globe as a facile means of communication between proletarians sundered from each other by mountain ranges and seas. And it has come to pass that today Soviet Russia can boast that it has 16,000 registered Esperanto linguists. Numerous Chinamen and Koreans are said to have perused works of Lenin, Tolstoi and Turgenev in Esperanto. Writing in Esperanto in the "North American Review" a quarter of a century ago, I foretold the conquest of the world for certain specific objects by the unaesthetic medium of communication invented by Zamenhof, and its employment by latter-day proletarians is at once incongruous and felicitous. It will surprise many readers to learn that the study of Esperanto occupies fourth place in those Soviet schools in which non-Russian languages are taught; the

first place being taken by English, the second by German, and the third by French. In the factories there are already circles which for nearly two years have been corresponding with factory workers abroad by means of Esperanto. The Smolensk Young Communist party keeps up a continuous intercourse in this language with the communists of the East. Numbers of country newspapers publish letters in Esperanto which they receive from soldiers, sailors and workers in different parts of Europe. The pioneer in Odessa corresponds with children abroad and receives letters, not only from Europe, but also from America, Japan and China, likewise in Esperanto, giving extracts from their poems and revolutionary songs. Workers in Soviet factories despatched to Scandinavian countries their "wall news" written in Esperanto, part of which made a deep impression on the foreign workers, who replied in eulogistic terms congratulating them on their advancement, and assuring them that they would march in line with their Soviet comrades. The factory workers and members of the Red Army are especially keen to learn Esperanto, and by way of keeping their knowledge from growing rusty several congresses recently pronounced their discussions in Esperanto. As a means of inter-communication Esperanto is making such progress that it has to be reckoned with as one of the most important factors in the new Russia."

SCIU

Ke linio "televizion as a satisfactory com-" mankaŝ en la unua kolumno de la aprila numero de S.K.

Ke pro presista fuŝo "Lidja Zamenhof en Pola Esperantisto" forestas de la piedo de "La Skribmaŝino de mia Patro" samnumere.

T. C. MASARYK.
(Ricevita per la ĉs. Konsulo en Sidnejo).

La prezidanto de la Ĉeĥoslovaka Respubliko, T. G. Masaryk, atingis la 7-an de marto nunjara sian 80-an jaron. Li naskiĝis en malriĉa sudmoravia familio, en kiu kuniĝis sango slovaka kun sango ĉeĥa. Liaj samlandanoj vidas en tio veran simbolon kaj antaŭdestinon: Masaryk estis destinita kunigi ambaŭ branĉojn de la ĉeĥoslovaka nacio, disigitajn antaŭ la reakiro de ŝtata sendependeco per politika landlimo, t.e. la ĉeĥan (boĥeman), vivantan en Bohemio, Moravio kaj antaŭe aŭstria parto de Silezio sub regado de l' antaŭmilita Aŭstrio, kaj slovakon, regatan de la estinta Hungarujo. La universitatajn studojn kaj la komencon de sia universitata kariero faris Masaryk en Vieno. Poste li eniris la universitaton de Praha.

Masaryk dediĉis sin al detala studado de eŭropaj nacioj, kaj jam en la naŭdekaj jaroj li gajnis varman simpatian de sudslavoj per sia deklaro favora al Bosnio kaj Hercegovino, kaj de popoloj per kondamno de la kontraŭpola reĝimo en Ruslando. Lia detala historia studo de la propra nacio rezultigis vicon da sciencaj verkoj en kiuj li formulis la filozofion de la historio de l' ĉeĥa nacio.

La milito, kruela konsekvenco de la eksterlanda politiko aŭstria-hungara, elpelis Profesoron Masaryk el lia patrujo. Li elmigris kaj starigis por si programon de batalo kontraŭ la monarkio je la flanko de la okcidenteŭropaj kaj usona demokratioj. Kiel elmigrinto kaj ĉefo de la ĉeĥoslovaka revolucio li faris dum kvar militjaroj vojaĝon ĉirkaŭ la mondo proklamante la bezonon neniigi la Habsburgan monarkion. El Svisujo li vojaĝis al Parizo, de tie al Londono, en printempo de 1917 en la revolucion Ruslandon kaj fine trans la tutan Siberion kaj Japanujon li atingis Usonon. Sub lia direktado kaj kun helpe de eksterlandaj ĉeĥoj, precipe de D-ro Beneš kaj Stefanik, estis kreata el la estintaj aŭstrohungaraj militkaptitoj de ĉeĥoslovaka nacieco multcentmilkapa armeo ĉeĥoslovaka, partopreninta en Italujo, Francujo kaj Rusujo la batalojn kontraŭ la t.n. „centraj potencoj“ (Aŭstrio, Germanujo, Bulgarujo kaj Turkujo).

La laboro de Masaryk estis kronata de plena sukceso: la nacio ĉeĥoslovaka kaj ĝia revolucia armeo, batalanta por sendependeco kaj memstareco de sia nacio, estis jam dum la mondmilito rekonita de la aliancaj ŝtatoj kiel nacio sampartia kaj kune militanta; sekve de tio Masaryk povis la 18-an de oktobro 1918 proklami la ĉeĥoslovakon sende-

pendecon kaj formigon de provizora registaro. Pro siaj meritoj je reatingo de la ĉeĥoslovaka sendependeco la 28-an de oktobro 1918, Masaryk estis elektata prezidanto de la respubliko; tiun ĉi oficon li povas okupi dumvive.

Masaryk ne ĉesis labori sur la kampoj de literaturo kaj scienco eĉ dum kaj post la milito. Inter liaj verkoj el tiuj periodoj aktualigas precipe lia verko „La nova Eŭropo“, en kiu li dum la milito formulis kaj priargumentis la bezonon de postmilita reorganizo de Eŭropo, kaj „La tutmonda revolucio“, en kiu li detale pritraktas sian agadon dum la mondmilito. Lia antaŭmilita „Rusujo kaj Eŭropo“ estas rigardata kiel vera klasikaĵo.

Legantoj scias jam, ke li favoras Esperanton, konsiderante ĝin unu el la rimedoj por unuigi la homaron.

D-ro A. Hartl.

CHRISTCHURCH, N.Z.
Esperantema gazeto.

S-ro N. Bell sciigis, ke unu tagĵurnalo en Christchurch aperigos monate Esperantan kolumnon. Ankaŭ, li disaŭdigas ĉe la radjejo en ĉiu sessemajno.

BALLOT "RESULT."

Ten per cent of those on the "roll" returned slips (vide no. 116). While such a response falls far short of that representative expression sought, we feel that the prevailing opinion of readers is against any suggested amalgamation with another paper. Voting: (1) 14, (2) 7, (3) 2.—(Red.)

MODELA TEKSTO.

Antaŭ ĉio (kaj tio ĉi estas la plej grava) ni devas labori diligente kaj ne malvarmigante por la afero kaj tute ne zorgante tion, kion diras aŭ faras aliaj. Estas multaj, kiuj, komprenante bone la utilecon de l' afero, alfalas al ĝi en la komenco tre varmege, certe kredante, ke post kelkaj monatoj la tuta mondo jam estos plena de la lingvo internacia; sed kiam post kelka tempo ili vidis, ke la mondo estas ankoraŭ trankvila, ke la plej granda parto de l' mondo eĉ ankoraŭ ne scias pri la afero, ke la gazetoj ne alportas ĉiutage sensaciajn novaĵojn pri la irado de l' afero, —ili tute malvarmigiĝis por la afero. De la efemera laboro de tiaj amikoj la afero ne sole nenion gajnas, sed kontraŭe, ĝi nur perdas. Sed efektivaj amikoj de l' afero ne rigardas, ĉu la afero jam faris multon da bruoj kaj ĉu ĝi estas jam sufiĉe "en modo"; profunde kredante, ke la afero estas utila kaj havas estontecon, ili laboras sen-

brue, sed diligente kaj konstante, ĉiu en sia urbo, en sia lando kaj laŭ siaj fortoj, —kaj danke la laboron de tiuj ĉi amikoj mi esperas, ke l' afero baldaŭ kaj sen bruo vastigos en la tuta mondo. (Zamenhof, Aldono al la Dua Libro-1888).

ESPERANTO ON THE MARCH.

Since our last issue we have learned—

That the late Dr. John Buchanan of Scotland, has left by will £4000 for the establishment of a lectorate of Esperanto at the University of Liverpool, and for prizes to be awarded to registered Esperanto students at other universities. A further £1000 has also been bequeathed by him to the British Esperanto Association.

"JAM" KAJ "ANKORAŬ.

Malgraŭ klopodado de la redakcio englitis en la lastan tekston de S.K. ofte renkontata eraro, uzo de "jam" anstataŭ "ankoraŭ" en certaj frazoj havantaj en si nenian ideon de stata ŝanĝo. Sub "Takto" troviĝas "ĉar la granda Esperanta Vortaro ne jam aperis." La verkinto tre supozeble volis komprenigi, ke "la E.V. ankoraŭ ne aperas." Sed se li korekte esprimis la penson sian, uzante la formon "ne jam aperis," ni devas bedaŭrege ricevi la baton, sciigi, ke la direkto de la "Granda Vortaro" ŝanĝis la decidon eldoni la verkon!

Sed ekzemplo laŭte parolas. "Ĉu vi jam trovis vian horloĝon?" (ĉu via stato de perdinteco ŝanĝis jam en staton de trovinteco?); "Mi ĝin ankoraŭ ne serĉis" (nenia ŝanĝo de stato). "Mi jam ne vizitos vin" (signifas ŝanĝitan intencon). Forte konsilata estas, fundstudi ĉi tiujn du vortojn.

SOVETA PEDAGOGIA REVUO.

De Moskvo 11, "Dvorec Truda," ĉambro 558, ni ricevis kelkajn ekz. de supra gazeto, dediĉita al klerigado de la nova Rusujo. La red. tre petas, ke ni kontaktigu ĉitieajn instruistojn kun lia eldonaĵo, kiu laŭ lia certigo donas veran bildon de la nuna batalo por likvidi la teruran heredaĵon de malklero, kiun devis akcepti la sovet-registaro en 1917. La kajeroj estas tradukitaj de membro de Lingva Komisiono de Soveta Esperantista Unio, kaj enhavas kelkajn formojn ecajn je la proletaria literaturo. Unu el la kajeroj speciale pritraktas la demandon "lernejo kaj religio." Religio estas samklasigita kun alkoholismo, diboĉado kaj malsanitar-eco, kio estas, laŭ konvinko de multaj ĉe cetera aprobantaj la bolŝevikan pro-

gramon, ekstrema paŝo malsaĝpolitika. Linioj, kiaj la jenaj, renkontas al forta ĉuo flanke de almenaŭ konsiderinda parto de okcidentaj instruistoj: "Ĉiuj konoj kaj scipovoj estas akiritaj per eksperimenta, esplora metodo, kaj la religio kaj ĉio bazita sur aŭtoritateco kaj formala kredo, estas la plej serioza malhelpaĵo por ekposedo de ĉi tiu materialo." Diskutinda estas la pure materialisma edukbazo soveta. Ĉu fakte, ke "sendiula" scienc esploristo faras la plej grandajn eltrovojn? La nomoj Newton, Kelvin, Lodge inter oceano da tiaj, tre pridubigas jeson al tiu propozicio. Cetera, povas esti, ke la kredo ne tre influas la marŝon de l' scienco. Ekster tiu akre disputata demando, supozeble estas, ke en vastaj rondoj oni sentas admiron al la brava lukto, kiun entreprenis sub treega ŝarĝo la sovetaĵ gvidistoj, firmintencante forbalai sklavecojn de la estinteco.

Iom la atenta leganto sentas ankaŭ mankon de paĝoj pritraktantaj la amaraĵojn faktajn pri senhejmaj vaginfanoj kaj la putrigadon de la rusa popolo pro libera vodkaovendado.

La stilo lingva estas flua ĝenerale, nur unu-du linioj ŝajne trorapide verkigis. "la samaj kun (kiel) la simio". En kio kuŝas diferenco inter "uzino" kaj "fabrik(e)o", "kulto" kaj "konfesus" kaj "sekte"? Ni rimarkas iom ofte la germanecan sintaksajon: "Ĉiuj ĉi faktaj atestas pri ofensivo de la organizigintaj sub standardoj de la ekl-ezio klasmalamikoj..." La soveta lingva komisionano pensas bone, enkonduki "dominanta," "metodika" (?), "stabila" (firma), "subordi" "selekti," "noci" (It. nuocere, to hurt, to prejudice). Ie li uzas "tiel aŭ alie," ie "tiel aŭ aliel" samsence: "batalo por kreo (krei) la blankan homon de Dio": "anti" uzata prefikse. Malgraŭ la nudvorta prezento de la soveta intenco koncerne la lernejon, aŭ pliĝuste pro tiu malkaŝeco, ni rekomendas la kajerojn al ĉiu pedagogiema. Tre interese kaj kon-dona enrigardo en vivon de popolo faranta flamkoloran paĝon de l' historio. Prezo 25 kopekoj.—(Robo).

ESPERANTO A BRIDGE.

In 1919 a London paper "The Future" offered a prize of money for the best translation of a piece of English into Italian. Samideano W. Phillimore, although ignorant of the Italian language, won the prize, and this is how he did it. He put the English into Esperanto, and then sent this translation to a correspondent in Italy, who translated it into Italian. This was sent by Mr. Phillimore to

"The Future." After the awarding of the prize to him, our samideano wrote to the editor, explaining the case, and leaving it to his judgment to alter the decision in favor of some other translator. He made it clear that he entered the competition only to demonstrate the fitness of Esperanto as a translation medium. The editor, however, sent the money to Mr. Philimore, who divided it with his Italian correspondent.

Here is a recent instance of how Esperanto can bridge two languages. The Norwegian Odd Arnesen's book on the polar flight of the "Italia," an impressive volume, richly illustrated, has appeared in a Czech translation by Otto Ginz. The preface makes it clear that the translation was made possible by Esperanto. Ginz used the Esperanto manuscript of Jens Schjerve of Oslo, which furthermore is now forming the text for a translation into Japanese. Ginz's work is both a model rendering into Czech, and a striking advertisement for Esperanto.

ANONCO.

Esp. Grupo dez. interŝ. p.k.il. (p.m. bildfil.) p.m. let. pri ĉ. temoj. Resp. garantiata! A. W. Zinke, Chemnitz, Rottluff 118, Germanlando.

PAROLO DE LINCOLN.

Oratorita ĉe dediĉo de la tombejo en Gettysburg, Penn., Usono, la 19an de novembro, 1863.

Antaŭ okdek sep jaroj niaj prapatroj naskis sur ĉi tiu kontinento novan nacion generitan en libereco kaj dediĉitan al la propozicio, ke ĉiuj homoj estas kreitaj egale.

Jam ni estas okupitaj pri granda civila milito, kiu provas, ĉu tiu nacio, aŭ iu nacio tiel generita kaj tiel dediĉita, povas longe daŭri. Ni estas kunvenintaj sur granda batalkampo de tiu milito. Ni estas alvenintaj por dediĉi parton de tiu kampo, kiel finan ripozlokon por tiuj, kiuj ĉi tie donis sian vivon, por ke tiu nacio vivu. Tute dece kaj taŭge estas, ke ni faru ĉi tion. Sed, laŭ pli larĝa senco, ni ne povas dediĉi, ni ne povas konsekri, ni ne povas sanktigi ĉi tiun teraĵon. La kuraĝaj viroj, vivaj kaj mortintaj, kiuj batalis ĉi tie, jam konsekris ĝin tiel verege, ke estas ekster nia malforta povo, aldoni al aŭ forpreni de ĝia sankteco. La homaro ne multe rimarkos aŭ longe tenos en memoro, kion ni diras ĉi tie, sed ĝi neniam forgesos, kion ili faris ĉi tie. Estas por ni vivuloj, sur ĉi tiu loko sin plibone dediĉi al

la ankoraŭ nefinita laboro, kiun ili ĉi tie batalinte tiel noble jam progresigis. Estas plibone, ke ni ĉi tie sin dediĉu al la granda tasko ankoraŭ restanta antaŭ ni; ke de ĉi tiuj honorataj mortintoj ni prenu al ni pli da sindediĉo al tiu celo, por kiu ili ofere donis la finan plenmezuron de sindediĉo; ke ni ĉi tie fidele ĵuru, ke ĉi tiuj falintoj ne estu vane mortintaj; ke sub Dio ĉi tiu nacio havu renaskon de libereco, kaj ke regado de la popolo, per la popolo, por la popolo, ne pereu de sur la tero.

ESPERANTO ON THE MARCH.

Enthusiasm in Northern Europe.

Thanks to the revolutionised teaching methods of the Rumanian priest Andre Che, Esperanto has, during the last few months, scored smashing victories over indifference and scepticism in Sweden. Che, who was invited by the Swedish Esperanto Federation two years ago to demonstrate his "direct method" to the public, is now ably supported by brilliant disciples, his countryman Tiberio Morariu; an Indian, L. Sinha; a Norwegian, R. Bugge-Paulsen; and two Estonians, Henrik Seppik and Mdme Pahn, who as a result of Che's convincing success were also invited by the Federation. The victories are the culmination to a well-planned campaign, in which Esperanto was, as never before, taken right to the public. The Indian Sinha in a 12 months' itinerant lecture tour addressed over 25,000 people in Esperanto, his message being translated immediately for the non-Esperanto part of the audiences. It is estimated that some 50,000 attended lectures delivered in Esperanto, while not fewer than 15,000 have begun to learn the language. The Swedish press featured Esperanto in thousands of articles.

Two years ago the Swedish teaching bodies regarded Esperanto with indifference. Personal appeal, however, induced 20 teachers to enter the first Che course, in Stockholm. Such was Che's success that today the State subsidises the training of teachers in Esperanto, and it has been proposed to make the Swedish Esperanto Institute a Government institution. The Esperanto Tourist Commission has been formed also, to which the great Stockholm Exposition of 1930 has entrusted the whole of its advertising in Estonia. The Commission is expecting thousands of E-tists to visit the Exposition. Six courses have been established for tramwaymen in Stockholm, and the language is taught also

in the State Telegraph Service. So this summer one can ring up "Exchange" there in Esperanto!

An Esp-ist, Herr Frey, has been sent with high official credentials by the Austrian Tourist Agency in Vienna to tell forth in the tongue of Zamenhof the holiday attractions of Austria. He will give addresses throughout Sweden, Norway and Denmark.

As we go to press we learn that at Orebro, a small town of some 28,000 inhabitants, 430 persons have joined the Morariu course opened there.

(From "Heroldo de Esperanto.")

FANFARONULO.

La plej altaj societoj malfermas por mi siajn pordojn.

Jes, por ĵeti vin eksteren!

KURSO PER TRADUKADO

(kondukata de s-ro G. Gordon, F.B.E.A., sekretariino, f-ino B. Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Melbourne E.10.)

TRADUKO 7

LA CIGANA VIVMANIERO

Romaneco de stranga raso
(el "The Sun," Melbourne.)

Ĉar la registaro metis Ciganojn en la klason de homoj netaŭgaj por Aŭstralianeco, aro el dek sep homoj el tiu raso en la pasinta jaro celantaj (2) surlandiĝi kaj loksidiĝi (3) en Aŭstralio estis, laŭ ordono de la ministro de enlandaj aferoj, devigitaj reveturi al Unuigitaj Ŝtatoj sur la vaporŝipo Aorangi.

Jam en la reĝado de la Brita reĝo Henry (4) oka oni malaprobe rigardis Ciganojn. Tiu monarĥo estis la unua, kiu persekutis ilin, kaj post li reĝinoj Mary kaj Elizabeth ĝisiris dekreti mortpunon kiel rimedon por senigi la landon je Ciganaj bandoj.

Nova lando estas paradizo invite vokanta (2) tiajn nekontentulojn kaj vagemulojn, kiuj havas ŝtelistajn morojn similajn al tiuj de niaj plej antikvaj prapatroj. Aŭstralio, simile al Unuigitaj Ŝtatoj, altirus Ciganojn, ĉar ili deziras landon ne tro multehoman, por ke ili povu kamploĝi kie ajn plaĉos al ili tiel fari, tamen landon nek tro maldense loĝatan nek tro malriĉan, ĉar ili dependas de la prosperado de aliaj homoj por la vivrimedoj.

En Unuigitaj Ŝtatoj sin trovas Ciganojn en grandaj bandoj. Malnovaj dokumentoj sciigas (5), ke ilia ekzilo de Anglujo okazis precipe en la tempo de Britaj kolonioj en la nuna Usono. Tie la vagemaj Ciganaj familioj nun

veturas per aŭtomobiloj, kaj eĉ la malmultaj, kiuj loĝas en domoj kaj kies vivmaniero ŝajne estas normala, vagadis tra seso aŭ pli da landoj antaŭ ol loksidiĝi.

En multaj landoj sin trovas Ciganoj —rajdantaj azenojn en Arabujo—pedirantaj en Anglujo—en karavanoj en Hispanujo—en la foirejoj de Rumanujo—sin kaŝantaj en la montaj regionoj de Tirol kaj Svislando—kamploĝantaj en fjordoj de Svedujo kaj Norvegujo—senmone interŝanĝantaj objektojn kun Laplandanoj en la regiono de la norda cervo—de ĉiu malŝatataj, tamen pretendantaj (7) esti raso el reĝoj kaj reĝinoj sen egaluloj en la mondo.

Precipe (8) pro tio, ke multaj homoj konsideras la vortojn "cigano" kaj "fivagulo" sinonimaj (9) ankaŭ pro tio, ke la Ciganoj nur laŭhazarde gajnas vivrimedojn kaj ĉie sin trovas suspekto rigardataj, George Borrow diras, ke pri neniu alia raso en la mondo estas pli granda kampo por teoriado kaj konjektado. La verkoj de Borrow "The Romany Rye," "Gipsies in Spain," "Romano Lavo-Lil" kaj aliaj distingas tiun aŭtoron kiel la plej bonan aŭtoritaton pri la Ciganoj. Li plue diras:—Ilia moraleco estas tiel stranga, ke ĝi verŝajne ne tre edifus tiun parton de la socio ordinare nomatan (10) la bonorda (11).

La plimulto de esplorantoj pri la Ciganoj, iliaj moroj, kutimoj kaj lingvo konsentas pri tio, ke ili estas idaro de primitivaj triboj de Hindujo, aŭ elpelitaj (2) aŭ elmigrintaj (2) el tiu lando frue en la dek-kvara jarcento.

(daŭrigota).

NOTARO 7.

1. Preseraro. Traduko 6. En la lasta linio de kol. 1, "sezonon" (sezono).—2. Adjektiva participo. Notaro 1/6.—3. "loksidiĝi". Vorto uzita de Grabowski en "Sinjoro Tadeo," iv, 14. Por unu signifo de "settler" aŭ "loksidiĝinto" aŭ "loksidanto" estus bona.—4. Estas bone ne esperantigi nomojn de modernaj personoj.—5. "old records showing." Tiu Angla gramatika formo estas "nominativo absoluta," kiun ne posedas Esperanto. Por traduki oni devas ŝanĝi la frazkonstruon por ebligi la uzon de verbttempo. Cox 211, b. L.R.pĝ 67.—"pretendi" signifas "to claim," neniam "pretend" en la senco de "ŝajnigi".—8. La longa Angla frazo "chiefly" ĝis "than the gipsies" estas komplika. Pro simpleco en traduko bone estas dividi ĝin.—9. Predikata adjektivo. Oni subkomprenas "esti" antaŭ "sinonimaj." Cox 107 b.—10. "nomatan" rilatas al "parton."—11.

"respectable." Zam. uzas "bonorda" rilate al persono, vesto, k.t.p.

ATESTO DE EMINENTA RUMANO.

La konata verkisto kaj apostolo de la humanitarismo en Rumanujo, s-ro Eugen Relgis, kiu ĉiuokaze apogis nian movadon ĉu per artikoloj en la gazetoj, ĉu per helpo en sferoj de li alireblaj—kiu afable donis la permeson ke oni traduku liajn verkojn en Esperanto, kaj kies "Humanitaristaj Principoj" jam aperis en nia lingvo, persone ĉeestis la rumanan jarkongreson en Braşov, kie li alportis al ni sian varman saluton per jenaj vortoj:

Kiel literaturisto skribinta miajn verkojn en la lingvo rumana—la sola kiun mi, kiel multaj aliaj, ne pro ia selekto, sed dank'al nura hazardo, funde konas kaj regas—mi salutas antaŭ ĉio la junan literaturon esperantistan, kiu ne konsistas nur el tradukaĵoj, sed kiu estas rekta esprimo de la homaj sentoj kaj ideoj.

Esperanto faris sian ekzamenon pri matureco, kaj ĝin konfirmis ne nur la fakto ke ĝi povis traduki la verkojn de Shakespeare, de Goethe aŭ de Victor Hugo; ne nur la fakto ke ĝi povis pritrakti ankaŭ problemojn pri filozofio aŭ scienco pura: la ekzamenon pri matureco sukcesigis tiuj poetoj, romanverkistoj aŭ dramaturgoj, kiuj skribis siajn verkojn rekte en Esperanto. Ilia pensaro kaj iliaj sentoj estis redonataj en formoj, kiujn ni akceptis ne kiel artefaritaj kreaĵoj, sed kiel klara esprimo de nova literaturo komencanta konkeri la merititan lokon inter la universaj literaturoj.

La esperantistaj literaturistoj havas la maloftan privilegion eviti la certe deformantan operacion de la tradukiĝo. Ili lasis, je komenco de la 20-a jarcento, skribajn dokumentojn en lingvo vere universala per sia spirito kaj sia destino.

Kiuj ajn estos la bataloj por la suprematio inter la diversaj internaciaj lingvoj, ŝajnas al ni ke la venko de nun estas certigita al Esperanto.

Ne nur ĉar Esperanto havas multnombrajn organizaĵojn, centon da gaze-

toj kaj revuoj, bibliotekojn kun libroj diversspecaj—ne nur ĉar Esperanton legas kaj parolas milionoj da homoj el ĉiuj mondpartoj: la pernombra sukcesoj farigis iluzia, se la lingvo Esperanto (konsiderata de iuj ironiuloj kiel lingvo sen gramatiko) estus fiksiĝinta de la komenco en formoj definitivaj. La merito de Zamenhof konsiderinde pligrandigis pro tio, ke li komprenis, ke lingvo ne povas ekzisti se ĝi ne estas viva organismo. Lingvo ne povas havi antaŭe difinitajn kadrojn: ĝi stoniĝus, kiel ekzemple la latina lingvo—ĝi estus seka, nepraktika.

Zamenhof ne monopolis la rajtojn pri absoluta patreco, sed li transdonis al la Esperantista Akademio la taskon konservi al Esperanto la sukono de la vivo, ĝin riĉigante senĉese kaj donante al ĝi tiun flekseblecon, tiun naturan viglecon, kiun havas la kulturaj lingvoj. Tio estas garantio, ke ankaŭ Esperanto kaj ankaŭ ĝia literaturo havas brilan estontecon.

Tial ni, verkistoj uzantaj nacian lingvon, sentas nin solidaraj kun la Esperantaj verkistoj. Solidareco pli ol profesia. Ni restas konvinkitaj ke finfine alvenos la tempo, kiam la literaturistoj skribantaj rekte en Esperanto estos en la unua vico de la universala atento—kaj ke la verkisto franca, angla, germana, hinda aŭ rumana, kiu estos tradukata en Esperanto vidos en tio plej altan honorigon kaj solenan prezentiĝon antaŭ aeropago solena.

EUGEN RELGIS, en "La Movado."

BLANKULO SOVAGE VIVANTA.

La miriga rakonto pri William Buckley.

Unu tagon, anareto de homoj ĉe Port Phillip (en ŝtato Viktorio), laborante ĉe ĝardeno kultivo, ekvidis apud si tre altstaturan figuron. Ĝi estis malstrikte vestita per didelfa pelt, havis haŭtkoloron iom tre plipalan ol tiu de la indiĝenoj kiuj lin akompanis. La surprizitoj miregis pro tiu stranga aperaĵo kaj tre eble ankaŭ iom pritimis ĝin.

"Kiu vi estas?" ili demandis. La veninto nur balancis la kapon nekom-

SUBTENU LA SAMIDEANAJN METIISTOJN !

PERCY HOLMES
Elektristo Kaj Radiisto.

Lumiloj, gladiiloj, purigiloj, motoroj, ventumiloj sperte instalitaj kaj riparitaj. Se via radia aparato ne bone funkcias, tuj sciigu al P. Holmes, 212 Noone str., Clifton Hill.

Memoru—Por ĉio elektra.

Telefonu: JW 4017.

prenante. Ŝajnis, ke longe li serĉis manieron informi pri io. Jen li subite montris sur la brakon, sur kiu estis videbla tatuaĵo "W.B." La rigardantoj sugestis al si ĉiujn de ili konatajn nomojn, kiuj komenciĝas per tiuj literoj. Estis facile konstati pri la tresupozebleco de "W" por William, kaj ili jam pripensis la eblecon de Burgess por la "B," kiam la strangulo ekbalutis "W—William B—Buckley" (elp. ŭiljem bokli). Donante al li panon ili aŭdis lin diri "bread" (pano).

Nur malrapide revenis lia patra lingvo al lia memoro, ĉar jam 30 jarojn li ne ĝin parolis, kaj prituŝante sian historian li senkonscie ekuzis ofte la lingvon de la indiĝenoj.

Hodiaŭ, la 27an de decembro, 1929, jam pasis 126 jaroj de kiam li forkuris la kolonieton de kapitano Collins fonditan en 1803 ĉe Sorrento. Buckley, kiu estis sendita el Anglujo kiel punlaborulo, sukcesis forkuri sekrete kun kelkaj samsortuloj, sed post du semajnoj unu el tiuj malespere decidis reiri en malliberecon. Pri la ceteraj Buckley povis nenion pridiri. Li estis treege malparolema, probable pri tio, ke li estis tro malinteligenta ion rememorigi al si. Nur malmulte li informis siajn demandantojn, krom nur tio ke li ne sciis, ĉu la indiĝenoj, kun kiuj li rekontiĝis, bonvenigos aŭ rostos lin por manĝi. Sed malgraŭ lia timo ili amike sin kondukis kontraŭ li, donis edzinon, kiu poste lin forlasis por aliĝi al aliulo, kaj pro tiu peko la tribo ŝin mortigis. Buckley diris, ke dum la unua jardeko tiaviva li ĉiam timis, ke rivalaj triboj lin mortigos. Tridek jarojn li vivis samkiel sovaĝa indiĝeno.

Iam boato aliris Port Phillip por hejtoligno. Ekvidinte ĝin Buckley enkuris la maron direkte al ĝi kun krio, "Mi estas blankula homo," sed la maristoj, teruritaj de lia aspekto, remegis for de li returne al la ŝipo.

Pri Buckley oni tre ofte esprimis tro nemeritan kompaton. Kvankam li akre suferadis; devis satiĝi per indiĝenaj manĝoj; loĝaĉi en krudaj ŝirmejoj laŭnigrole, li tamen ne suferis tiom, kiom suferus inteligenta homo. S-ro Fawcner priskribis lin "bulo da materio, pro

senmenseco nekapabla doni ian utilan informon."

Komence oni pensis enoficigi lin kiel paciganton inter la indiĝenoj kaj la blankulaj kolonianoj, sed ankaŭ por tio li montrigis preskaŭ netaŭga, ĉar nur unu fojon li inklinigis la indiĝenojn ne ataki la blankulojn.

Finfine oni sendis lin al Hobart (Tasmanio), kie, ricevanta pension de 52 funtoj jare, li deĵoris kiel pordisto ĉe la Fabrikejo por la Punlaborulinoj. En 1839 li edziĝis kun vidvino, "kiun," skribis samtempulo, "ni ofte vidis promeni kun ŝia neparolema edzo, kies brakon ŝi nur malfacile povis tuŝatingi. Sendube ŝi vidis ion amindan en tiu viro, kiu ŝajne tiel forte malŝatis kuneston kun siaj kunhomoj."

Li mortis en 1856, havanta aĝon de 76 jaroj, kaj estas tre strange ke li aldonis absolute nenion al la jama kono pri la moroj kaj pensoj de la aŭstralia indiĝeno. La silento de la "bush" (sovaĝejo) ŝajne ĉirkaŭvolvis lin kiel vualo, kaj lia miriga vivmistero restis en li neniam elrakontita.

Rimarkinda fakto ankaŭ estas ke la ununura homo, kiu havis similan vivsperton, nome iu James Morrill, vivinta pli ol 20 jarojn kun la kvinslandaj nigrujoj, ankaŭ ne kapablis doni ian informon pri tio. Same neparolema kiel Buckley, li silentis priparoli sin eĉ longe post alveno de blankuloj en lian regionon, kaj iam penante fareti tion, li nur povis sufoke elgorĝigi balbutusojn.

AL NIAJ SUBTENANTOJ

Danke ni kvitancas le jenajn abonojn kaj donaco kaj esperas, ke tiuj, al kiuj la Redakcio sendis urĝan peton, decidus reaboni, tiel akirante al si konscion esti plenumintaj gravan servon al la movado tra Aŭstralazio. F-ino Chisholm, 4/6, aprilo, '30; J. Skurrie, 4/6, feb., '31; G. Kvarnstrom, 4/6, sep., '30; J. Cossar, 4/6, marto, '31; D. Calnan, 4/6, marto, '31; Sidneja E. Klubo, rezultajo el danco, donacis 53/-; P. Leahy, 9/-, julio, '30; Vendo de s-ino Sainsbury, 2/4; f-ino E. Lanyon, 4/6, julio, '29; f-ino Gwenneth Lanyon, 4/6, okt., '30; W. McPherson, 4/6, jan., '32;

HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiginto, kiu lerte riparas ĝin je malalta kosto ĝis re-

Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

s-ino C. Blainey, 4/6, junio, '30; D. Thomson, 4/6, feb., '31; Wellington Esp. Club (anonco kaj abono), 10/6, feb., '31.

PLAYS IN ESPERANTO.

An English dramatic critic recently visited a little theatre in Blackfriars to see a performance by English amateurs in Esperanto. The director of this unusual presentation was Mlle. de la Bruyere. She is a missionary of Esperanto, and was a friend of Dr. Zamenhof, the founder. Mr. F. T. Grein, who was one of the guests of this lady, in the "Illustrated London News" has written about his impressions and the result of a talk which he had on the subject of this world language and the theatre. He writes that he was astonished to hear that London already possesses a flourishing Esperanto club; that even among the professional actors there are some who speak it fluently, and the demand is such as to warrant further performances not only of translations, but of plays written by English authors in the world language.

He asked Mlle. de la Bruyere to tell him something more about this growing movement in our midst, especially so far as it might affect the world of the theatre.

This year she stated that the society was determined to take a step forward. They wished to show that Esperanto was artificial in nothing but theory; that it was capable of expressing the finest shades of thought, and was at the same time one of the most musical of languages. Esperanto would take its place beside the other languages of the world, its elder sisters, when they had created the Esperanto Theatre. The beginning must of necessity be modest, but the possibilities were almost infinite; their task was to make known the masterpieces of the world, even in the countries most distant from their own, by means of Esperanto. And to make known, too, the authors already writing in Esperanto—Julio Baghy and K. de Kalocsay, of Hungary; Raymond Schwartz, of Paris; Jean Forge, of Poland, and many more, and to encourage the growth of the new culture which is springing up.

The twenty-second Universal Esperanto Congress will be held in Oxford in August. About 1500 delegates are expected from more than forty countries. At this congress a play, representative of the English stage, will be

presented by a cast drawn from many countries before what must surely be the most cosmopolitan of all audiences.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro A. Dewar; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝejo Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikadojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbano Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FB.E.A. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.